

LA VERDA LUPEO



INFORMILO de ELF/AREK

Aŭgusto 2021

53a jaro

N-ro 187

Esperanto-Ligo Filatelista /Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj

Redakcia skipo: Bert BOON - Merelhof 8 - BE-3300 Tienen

Elda DOERFLER - Via del Ghirlandaio 18/1 - IT-34138 Trieste

James REZENDE PITON - Rua Aristides Perini 48 - BR-13141-025 Paulínia-SP

DOLFA

Fremduloj, atentul! Ne vojaĝu hejmen sen „Dolfa“!

„Dolfa“ estas praktika novaĵo por vojaĝantoj per vagonaro.

STIKEL
Budejovskij, Praha - a. s.

„Dolfa“ defendas vin de priŝteloj

RENDEVOYAGE EN CHEMIN DE FER AGRÉABLE

„Dolfa“ estas tuketo pendanta je risortoj por komforto de vojaĝantoj per vagonaro. Oni ĝin pendigas sur breto por pakajoj. La kunmentitan „Dolfa“ oni metas en poŝon.

La prezo kun ujo Kč 30.—.

Acetebla en ĉiuj ferindustriaj magazenoj k. s.

Fabrikanto:
ADOLF TREJBAL,
PRAHA VII-Kostelni 12.

Oni akceptos reprezentantojn aŭ privilegiejn vendistojn por fremdaj ŝtatoj.

la riprovaĵo

Karaj Geliganoj!

Por Vi, la plej lastaj novaĵoj pri aktivado de ELF-AREK. Ĝi partoprenis en du kongresoj: la unua estis la Virtuala UK, Belfasto, kaj la dua temis pri la Internacia kongreso de katolikaj esperantistoj. Ni prezentis videaĵojn dum la movada foiro (dufoje) plus du aliaj ene de la UK-programo. Por IKUE-anoj kaj aliaj spektantoj, estis montritaj religi-temaj fotoj, poŝtkartoj, glumarkoj ks, kio surprizis ĉiujn pro la abunda materialo tiutema.

Ĉi-foje - bonŝance! - nur belajn novaĵojn mi rakontas: tutunue, ni bonvenigas novan membron: João Tiago CAVALCANTE LIMA, brazilano el Manaus, Amazonio. Li ekde junaĝo estas fervora filatelisto kaj kolektas pm-ojn kaj stampojn. Liaj ŝatataj temoj estas: lumturoj, ŝako, skoltismo, al kiuj laste aldoniĝis ankaŭ Esperanto. Kiu helpas lin komenci sian novan kolekton? Jen lia retadreso: jtiagocl@hotmail.com. Antaŭdankon!

Dua bela novaĵo: James REZENDE PITON partoprenis julie en SAVPEX 2021 - <https://stampssa.africa/exhibits/#savpex> - Virtuala Ekspozicio organizita de Sudafrika Filatela Federacio - per angla versio de unu panelo (16 folioj) pri *Esperanto tra la kribriroj de Poŝta Cenzuro*, kiu akiris 70 poentojn. En aŭgusto la portugallingva versio de tiu kolekto partoprenis en BRAPEX 2021, la Brazila Filatela Ekspozicio, kiu same nur virtuale okazis. Ĝi tie konkeris 77 poentojn, kio ekvivalentas al vermejla medalo. <https://www.febrap.com.br/brapex-2021-um-quadro>. Krome li ĉeestis en la nova kategorio akceptita de FIP, tiu de poŝtkartoj. La 3-panela (48 folioj), portugallingva “Skolta Dejhavuo” akiris 83 poentojn kaj grandvermejlan medalon. Gratulegojn al li!

Via Elda

ENHAVO	
Elda DOERFLER - <i>Enkonduko</i>	2
James REZENDE PITON - <i>Esperanto tra cenzuro (1^a parto)</i>	3
M. kaj P. SUHADOLC - <i>Pri 300-dinara pm 1953</i>	7
Bert BOON - <i>Aperitivo Zamenhof el 1905!</i>	11
Elda DOERFLER - <i>Japanaj poŝtmarko kaj stampo</i>	15
Elda DOERFLER - <i>Pastro Inocento Seriŝev (2^a kaj lasta parto)</i>	16
SUR LA KOVRILOJ	
★ <i>Reklamo pri DOLFA</i>	

ESPERANTO TRA CENZURO (1^a PARTO)


James REZENDE PITON

Meze de la 17^a jarcento Britio starigis sian ŝtatan poŝtan servon kaj tuj poste sekreta servo ekspionis la enhavon de eksterlandaj korespondadoj. Se la 19^a jarcento donis teknikajn kaj organizajn rimedojn por la amasigo de la ŝtataj poŝtaj servoj, la 20^a jarcento multobligis la okazojn de escepta ŝtata kontrolo. En diversaj momentoj tra la jarcento oni vidis malferman, institucian kaj laŭleĝan ŝtatan enmiksiĝon en la privatecon de la korespondadoj. Tiu privateco estis principo, kiu des pli firmiĝis post la Artikolo 12 de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj (1948): “*Neniu suferu arbitrajn intervenojn en sian privatecon, familion, hejmon aŭ korespondadon, nek atakojn kontraŭ sia honoro aŭ reputacio. Ĉiu rajtas ricevi juran protekton kontraŭ tiaj intervenoj aŭ atakoj.*”

Tiun traesploron de la enhavo de normale sigelita korespondado fare de ŝtata oficisto oni nomas “cenzuro” sed sub tiu sola vorto ni povas kompreni tri eblecojn. Kio estas “cenzurita letero”? 1) la cenzuristo simple legis (kun ebla kolektado de informoj uzotaj de ŝtataj sekureservoj); 2) forstrekis vortojn aŭ tutajn partojn de la korespondado por ke ili ne atingu la ricevonton aŭ 3) la cenzuristo baris la vojon de la korespondado kaj revenigis ĝin al la sendinto, pro ne observitaj kondiĉoj - kaj ĉi-lastan oni nomas “forcenzuro”.

Dum revolucioj, civilaj militoj, regionaj militoj, grandaj militoj, diktaturaj periodoj oni vidis la rapidan starigon de cenzura servo, poŝta kaj komunikila, kiel strategia rimedo. Mi diras, ke la komunikada privateco estas inter la plej fruaj pereintoj en ĉiu tia konflikto.

Cenzuro okazis kaj en la civila poŝto kaj en la militista poŝto, ofte eĉ en ambaŭ. La celoj estis apartaj: mesaĝojn inter ordinaraĵoj oni esploris por ekkoni politikajn starpunktojn aŭ bari la informfluan de opoziciuloj al la reĝimo. La korespondadoj de/al militistoj povus senintence riveli strategiajn informojn kiel estontaj militaj movoj kaj la situacio de la fronto. La civilaj prizonuloj kaj militkaptitoj same havis siajn korespondadojn traesploritaj.



En la unuaj tagoj post la mobilizo de Francio kaj eniro en la Unuan Mondmiliton (la 2^{an} de Aŭgusto 1914) jam estis aprobita la leĝo pri cenzuro. Al francaj militistoj estis malpermesate: indiki en leteroj la aktualan lokon; komenti pri militaj manovroj; aludi al perdoj, mortintoj, vunditoj, militkaptitoj; uzi la civilan poŝton aŭ transdoni leteron al peranto kaj... plendi pri la manĝaĵo.

Pro la elstare vigla aktivado de esperantistoj en internacia korespondado, kio okazis al iliaj certe multaj korespondadoj en Esperanto tra cenzuraj instancoj? Kiu estis la sinteno de trejnitaj cenzuristoj antaŭ E-letero aŭ karto? Dum deĵortago ili analizis la enhavon de plurdekoj da mesaĝoj en kelkaj lingvoj. Tiu demando tiklis min jam antaŭ sufiĉe multaj jaroj kaj mi komencis sistemigi mian komprenon pri tio. Vi vidos kelkajn ekzemplojn.

En *La Verda Lupeo* 181 (Okt. 2019) mi prezentis dokumenton, kiu montris, ke oni konsciis pri la rolo de esperantisto kaj militisto Salomon Kornfeld (ps. Grenkamp) en Oderberg. Alia militisto, oficiro en la alta stabo de la franca armeo, ekzemple uzis la lingvon en pormilitista korespondformularo. La senpaga afranko validis nur en franca teritorio kaj li celis korespondanton en Usono:

**CORRESPONDANCE
DES ARMÉES DE LA RÉPUBLIQUE**

CARTE EN FRANCHISE

* Contrôle par *
Autorité Militaire

Adresse :

M. P. H. Battey
Town City
Town
U. S. A

EXPÉDITEUR :

Nom et prénoms : bacheler

Grade : Lieutenant

Régiment : Etat Major de

ou Service : Colonie / Esquadrille

Boîte postale : 74

Secteur postal n° : 74


(Les indications ci-dessus sont à reproduire dans l'adresse de la réponse.)

1875. N. r. — Modèle A' pour les troupes en opérations.

REPUBLIQUE FRANÇAISE
10c
POSTES

Kontrolita de Militista Aŭtoritato tekstas la franclingva stampo sur afranklibera karto por francaj militistoj, sendita al Usono en Decembro 1916.

La sendinto, subleŭtenanto Couchefeu skribis sur la dorso en plena Esperanto.




Dorsflanke: supra averto atentigas la militiston per “Liverota al la milit-poŝtestro. Nenia indiko pri la sendoloko, nek informoj pri intaj aŭ ontaj militoperacioj. Aliokaze ĝi ne sendigos”.



Detalo de karto skribita en Esperanto, Aŭstrio-Hungario, 20.06.1915, sendita de civilulo, el Krásno nad Bečvou al Usono.


Stampo de la Imperia kaj Reĝa (K. u. k.) militista cenzuro dum traŭro en la fervoja stacidomo de Prerau, same en Moravio (nun: Přerov, Ĉeĥio).

Esperantistoj ne hezitis uzi la lingvon kaj foje propravole indikis sur la koverto/karto pri kiu lingvo temas:



El Borås (Svedio), Septembre de 1917,
al Philippeville (Alĝerio, tiam Francio)

Kaj inter movadaj instancoj, kiuj plu funkciis:



Letero supre malfermita de brita cenzuristo, sendita de la Centra Oficejo de UEA en Ĝenevo al Brita E-Asocio. Alvena datstampo en la 10^a de Aprilo 1918.

En la venonta numero ni atentis pri la intermilita periodo, kiam novaj sendependaj landoj iom pli daŭrigis cenzuradon, kaj ankaŭ la intensa cenzurado dum la Hispana Civila Milito (1936).

SOLVITA LA MISTERO PRI LA RUĜA SURPRESO ĈE LA MARGĜENOJ DE LA OK-POŝTMARKA 300-DINARA FOLIETO ZONO B TLT

*verkis slovene Mauro Malusa kaj Peter Suhadolc**

La historio pri la folieto el ok poŝtmarkoj 300-dinaraj, Zono B Teritorio Libera Triesto (TLT) kun ruĝa surpreso STT-VUJNA kaj kun ĉemargenaj surskriboj, estas pli aŭ malpli konata, sed ĝia origino tute ne. Antaŭ kelkaj jaroj sufiĉe plenkomplete priskribis en artikoloj Veselko Guŝtin: la unua, slovenlingva, aperinta en Nova Filatelija (Guŝtin, 2011) kaj la dua, pli poste, en la Bulteno de la Poŝthistoria Asocio Friulo Julia Venecio (Guŝtin, 2017). Tial, per ĉi raporto, ni resumos nur la ĉefajn faktojn, invitante la interesatojn konsulti la suprediritajn artikolojn. Tiuj de Guŝtin tamen ne sukcesis doni respondon al serio da demandoj. Per jena komunikaĵo ni konigos, kiel ekestis tiu ideo pri presado de ruĝa surskribo trilingva sur la folietaj margenoj: “Esperantski Kongres / 38-a Universala Kongreso de Esperanto 1953 / Congresso dell’Esperanto”.


La poŝta administracio de Zono B Teritorio Libera Triesto (TLT) mendis al la ĉefdirekcio de PTT de Beogrado 15 000 ekzemplerojn de la 300-dinara poŝtmarko. Oni ricevis nur 12 000, presitajn en dekdu-poŝtmarkaj folietoj kun blankaj margenoj, tio egalas al 1000 folietoj. Tuj la poŝta administracio plendis, postulante la alsendon de la ceteraj 3 000. Intertempe, en la beograda presejo, estis jam tranĉita la restanta papero, por antaŭpreparo de la jugoslavia folieta varianto, konsistanta el po ok poŝtmarkoj. Ĉio ĉi okazis sekve de damaĝo al la suba parto de la kliŝo dum ĉi purigado. Tial estis preparitaj por la poŝta administracio Zono B la restantaj 3 000 poŝtmarkoj en folietoj el ok pecoj, do entute 375 folietoj. Probable, pro

misatento aŭ eraro en miksado de koloroj, tiuj poŝtmarkoj ricevis pli lilan koloron anstataŭ la originala violo de la 12-peca folieto, kvankam la diferenco estis minimuma.

Bildo 1 Oktobre 1953, ekcirkulis inter la filatelaj komercistoj la ok-



poŝtmarka folieto, surhavanta la jam cititan ruĝan marĝenan surpreson (Bildo 1). La *Berner Briefmarken Zeitung* [Berna Poŝtmarka Gazeto; NN, 1954] skribis ke estas konata la ekzisto de 250 similaj folietoj, dorsoflanke numeritaj (Bildo 2). Krome oni aldonis, ke tiuj estis aĉetitaj de iu usonano. Perletere oni petis informojn al la direktoro de la poŝta administracio Zono B TLT, kiu, responde, klarigis la supre resumitajn okazintaĵojn kaj deklaris, nenion scii pri tiuj pli etaj folioj, kun randa surpreso. Plie li aldonis, ke la tuto estis vendita je nominala prezo. Surbaze de tiuj informoj la Katalogo *Zumstein* raportis, ke la ruĝa skribo estas private farita kaj sen filatela valoro. Fakte la *kulpigita* folieto estis vendita nur de komercistoj kaj ne de la poŝtejoj en Zono B TLT.



Bildo 2

Serio da demandoj tamen ne ricevis klarigon. Kiu estas la origino de la ruĝa surskribo sur la marĝenoj de la ok-poŝtmarkaj folietoj? Kiu estis la usonano, kiu aĉetis 250 folietojn? La poŝtmarkoj de tiuj folietoj devenas de tiuj 375 liveritaj sekve de protesto aŭ temas pri aldona eldonkvanto? Kial oni scias nenion prie ĝis nuna tempo?

Respondon al tiuj ĉi demandoj ekhavis Mauro Malusa (Malusa kaj Suhadolc, 2020), kiu en 2016, tra komuna amiko, havis la bonŝancon kaj plezuron konatiĝi kun Spartaco Dolazza, mortinta la 18^{an} de septembro 2018. Li estis unu el la *Sinjoroj* de triesta filatela fako, samkiel Wolf, Mondolfo kaj



Bildo 3

Bornstein. Dum ili babiladis pri filatelo, la konversacio falis sur la 300-dinaran E-poŝtmarkon Trieste B. Je ĉi punkto S. Dolazza iĝis serioza kaj ekrakontis sian veron pri la folieto el 8 pm-oj kun trilingva, ruĝa surskribo “38^a Kongreso de Esperanto”.

Tiam li okupiĝis pri vendado de poŝtmarkoj en filatela butikoj, heredita de lia patro kaj situanta en *Capo di Piazza*, Triesto. Inter la pluraj kunlaborantoj, estis alia triesta samfaka komercisto, Alexander Kroo, kies vendejo troviĝis en strato Roma 20; alian butikon li posedis en Nov-Jorko, Usono (Bildo 3). Post la eldono de la ok-poŝtmarka folieto, A. Kroo montris al

S. Dolazza paketon da 250 folietoj surhavantaj la *faman* ruĝan sur-

preson. La folietoj estis aĉetitaj de Kroo en la poŝtejo de Koper, danke al kompileco de poŝta giĉetisto kontraŭ pago de pli alta prezo, ol la nominala valoro. Sekve li iris al Rijeka, kie, ĉe la presejo *Zora*, estis presitaj la ruĝaj skriboj surrande.


Estante pure honesta filatelisto, S. Dolazza ekfuriozis, akuzante lin pri friponeco kaj tuj ĉesigante ĉian ajn rilaton kun li. Plie li informis la aliajn kolegojn Wolf, Mondolfo kaj Bornstein, kiuj neniam prikonsideris tiun folieton, asertante ke temas pri *filatela elpensajo*. Granda parto de tiuj folietoj estis senditaj de Kroo al lia fila-butiko en Nov-Jorko: tiel komenciĝis lia spekulado pri la “folieto kun ĉerandaj ruĝaj skriboj”.

La rakonto de S. Dolazza donas al ni la respondon al la supre cititaj demandoj. Tiuj folietoj estas parto de la eldonitaj 375 folietoj, senditaj al Koper, kaj do ne temas pri sekva aŭ privata eldonitaĵo. Tio klare komprenigas, pro kio ĝi ne aperas en la katalogo *Tergeste* [elp. Terĝeste] de Bornstein. Estis identigita la *Usonano*, aĉetinta la 250 folietojn, kaj malkaŝiĝis, kie estis farita la ruĝa preso. Krome klaras, ke Dolazza neniam volis disvastigi la okazintaĵon kaj, sekve, M. Malusa ne volis ĝin diskonigi antaŭ lia morto. Alia interesa detalo: kiam la direktoro de la poŝta administracio konfirmis, per sia respondo al *Zumstein*, ke ĉiuj poŝtmarkoj de la 375 folietoj estis venditaj je nominala kosto, klaras, ke la giĉetisto de la poŝtejo en Koper, vendinta 250 folietojn al Kroo, enspezis - ĉu friponakorde kun la direktoro? - konsiderindan kontraŭlegan profiton.

Konsekvence ni povas aserti, ke la poŝtmarkoj de la folietoj kun ruĝa preso surmarĝene estas tute aŭtentikaj, ĉar ili estis aĉetitaj ĉe la poŝta giĉeto kaj nur la ruĝa surskribo estas private farita. Tial se oni posedas poŝtmarkon Esperanto 300-dinaran Zono B TLT, siringokoloran kaj sen marĝenoj, tute ĝi estas originala. Cetere, okaze ke la poŝtmarko havu la suban randon, estus malfacile kompreni, ĉu ĝi originas el la folietoj kun aŭ sen ruĝaj presoj sur la marĝenoj (vidu bildon 1).

Bildo 4

Nia opinio estas ankaŭ interesa la registrita letero, sendita al Nov-Jorko (alvenstampo malfronte) kaj surhavanta la poŝtmarkon Esperanto 300-dinaran, siringokoloran, adresita al *Nassau Street 68* kaj pro tio nur je mallonga distanco de la filatelejo de Kroo (Bildo 4). Tre probable la adresito



estis lia konato aŭ kunlaboranto kaj do verŝajnas, ke la letero estis ekspedita de li mem.

Ĝis nun neniam mi vidis folieton similan al tiu de Bildo 1, sen skriboj ĉerandaj. La ceteraj 125 folietoj de la dua preso, venintaj al Koper, estis disigitaj por disdonado al abonantoj kaj, konsidere la grandan valoron de la poŝtmarko, estis venditaj minimumkvante ĉe la ĝiceto. Konatas nur kvaropa bloko, tio estas la duono de la originala folieto kun blankaj randoj (Bildo 5). Nuntempe, la folietoj kun ruĝa surpriso margena estas ofertitaj ĉe aŭkcioj je startprezoj de ĉ. 4 000 €; ni rimarkis eĉ ekzempleron kun duobla surpriso, je duobla baza kosto. La respondita folieto kun blankaj randoj, okaze ke ĝi estu eltrovita, estus monda rarajo, kies valoro certe estus tre alta.



Bildo 5

BIBLIOGRAFIO

Guŝtin V., 2011. Znamke za 300 din STO-VUJA, ki so izŝle ob 38. svetovnem Esperantskerm kongresu. *Nova Filatelija*, 2-3/2011, 12-14 (slovene).

Guŝtin V., 2017. I francobolli TLT-VUJA da 300 din, 38° Congresso Mondiale dell'Esperanto. *Bollettino Associazione Storia Postale del Friuli e della Venezia Giulia*, No 16, 38-41 (itale). *La poŝtmarkoj TLT-VUJA 300-dinaraj, 38^a Monda Kongreso de Esperanto. Bulteno de Asocio Poŝta Historio de Friulo kaj Julia Venecio*, No 16, 38-41.

Malusa M. kaj Suhadolc P., 2020. Pojasnjen izvor rdĉega napisa na robovih bloka osmih znamk Cone B Esperanto za 300 din. *Nova Filatelija*, 4/2020, 14-16 (slovene).

NN, 1954. Esperanto-Kongress-Marken Triest Zone B, *Berner Briefmarken-Zeitung*, BBZ, 1/54, 13 (germane).

BILDOJ

1. Folieto Esperanto 300-dinara, kun ruĝa skribo ĉeranda.
2. Numerado malantaŭe de folieto Esperanto 300-dinara kun ruĝaj skriboj ĉerande.
3. Poŝtkarto kun memorstampo pri la filatela triesta Kongreso en 1948, eldonita de Alexander Kroo kaj surhavanta la adresojn de ambaŭ liaj vendejoj.
4. Registrita letero kun la pm Esperanto 300-dinara lilkolora, sendita al Nov-Jorko al adreso apud tiu de la Kroo-vendejo.
5. Kvaropa bloko, duona folieto ok-poŝtmarka kun blankaj randoj.

* Artikolo aperinta en la revuo *Nova Filatelija*, n. 4/2020, *Bulteno de Filatela Asocio de Slovenio*. Tradukis italen Mauro Malusa, esperanten Elda Doerfler.

APERITIVO ZAMENHOF EL 1905!

Bert BOON



1905 BOULOGNE-sur-MER - Carte-Photo du Congrès d'ESPERANTO
en Août 1905

1. Komerca glumarko el Bulonjo-ê-Mar



Jen ne-ordinara kaj ne-oficiala glumarko el la epoko de la Unua Esperanto-Kongreso en “BOULOGNE APUD MARO”.

Lando: Francio

Eldondato: okaze de la 1^a UK 1905

Eldonkvanto: *serĉata*

Formato: 24 x 36 mm

Bildo ortangula: 20 x 34 mm

Dorsflanke: gumo

Dentumo: 21 x 13


Koloroj: verda, kremkolora

Bildo: abunde ornamita kartuŝo kun brila stelo-blazono,

Ambaŭflanke: Esperanta flago (standardo)

Tekstoj: ekster la kartuŝo:	ambaŭflanke	APERTIVO ZAMENHOF
	supre kaj sube	APETITDONEMO
en la kartuŝo:	supre	SPECIALAJ FIŝKONSERVAĴOJ POR EKSTERSENDAĴO
	sube en rubandeto	DUCHOCHOIS
	sube	BOULOGNE APUD MARO


Rimarko:



El tiu letero ni sciigas, ke Maurice Duchochois (prononcu: moris duŝoŝua) en 1904 eklernis Esperanton. Ni tamen ne povas ne supozi, ke li petis helpon de pli sperta esperantisto. Okulfrapas ortografia eraro kiel “apertivo” anstataŭ *aperitivo* kaj strangaĵoj kiel “ekstersendaĵo” anstataŭ *eksporto* kaj “apetitdonemo” anstataŭ *apetitiga* aŭ *apetitiveka*!

2. La pioniro Maurice Duchochois (1862-1939)

Duchochois naskiĝis kaj mortis en Boulogne sur Mer. Li estis franca esperantisto kaj direktoro de akvoglaciejoj. Krome li funkciis kiel juĝanto ĉe la komerca tribunalo en Boulogne kaj estis ŝipekipisto por fiŝkaptado.



Li estis ankaŭ unu el la organizintoj de la unua UK kaj iniciatinto de la oficiala Esperantista standardo. Sur liaj ŝipoj je la unua fojo flirtis la Esperantista flago. Ne mirinde do, ke ambaŭflanke de la blazono sur la priskribita glumarko troviĝas la standardo! Li ankaŭ prezidis la bulonjan asocion “Esperantista Grupo de Boulogne sur Mer”. En la antaŭa letero, la 850^a el la kolekto de la perua pioniro Profesoro/D-ro Federico Villarreal, sendita de Duchochois la 27^{an} de decembro 1904 al Limo, li deklaras, ke li antaŭ nelonge eklernis Esperanton, do 42-jara.

Jen aldone du leterkartoj de Maurice Duchochois, propagandiloj favore al Esperanto kaj al la komerco de

Duchochois, kiuj montras lin ne nur kiel pioniro de Esperanto, sed ankaŭ de la ankoraŭ aktiva asocio IKEF (Internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio), fondita en 1885, kies antaŭulo estis EKI (Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio).



Poŝtkarto kun erara dato por la 1^a UK: 5-13 Aŭguste 1904



Poŝtkarto kun ĝusta dato por la 1^a UK: 5-13 Aŭgusto 1905

Bibliografio:

- Vikipedio: “Maurice Duchochois”
- “Enciklopedio de Esperanto” A-J, 1933-34, p.113
- Literatura Foiro: “La Lima-Letero de Ljudovik Samenhof el 1902”, aŭgusto 2020, n-ro 306, p. 227-236

TROVITA GLUMARKO



1914 - planita estis la 10^a UK en Parizo, antaŭvidinta la akcepton de ĉ. 3739 esperantistoj, el kiuj 2500 eksterlandanoj: rekorda nombro! La kongresejo estis la giganta kaj eleganta palaco Gaumont, la plej bela kinematografego en la mondo. Miloj da poŝtkartoj kaj da glumarkoj pri- kaj postkongresaj estis eldonitaj, sed, ho ve!, la homoj ne povas vivi en paco, tial ĉiuj preparoj por ĉi historia evento esperantista estis vanaj.

Memore de tiu UK, restas al ni nur la belaj esperantaĵoj: el tiuj, ĉefe abundo da glumarkoj. La plej konata estas la supra, kies bildo aperis ankaŭ sur la poŝtkartoj, poste tiu eldonita de la Esperantista Vagabonda Klubo, Montmartre 1914, kaj tiuj pri la postkongresaj ekskursoj, en pluraj koloroj. Laste mi trovis alian, kiun neniam antaŭe mi vidis. Jen ĝia bildo: mezuroj - 36 x 50 mm; la teksto estas francilingva; la glm aperis en 8 diversaj koloroj, laŭ Hirtsch-Katalogo. Ĉu iu el vi ĝin posedas?



JAPANAJ PM KAJ STAMPO

S-ro SOMEKAWA Takatosi tre ĝentile sendis al mi ekzemplerojn de la ĵus aperintaj individua poŝtmarko (IPM) kaj stampo (STA), eldonitaj okaze de la 69^a Kongreso de Esperantistoj en Kansajo, 31^{an} de julio - 1^{an} de aŭgusto 2021. La gastiganta urbo estis Kobe, kies foto videblas en la IPM, dum en la STA ĝi estas reproduktita grafike. S-ro SOMEKAWA mem farigis la IPM-ojn kiel memoraĵon pri lia kara amiko, s-ro MAEKAWA Haruja, kiu bedaŭrinde forpasis pasintjare, je la 29^a de julio. Pasia filatelisto ekde junaĝo kaj esperantisto, fidela membro de Elf-Arek de 1969, li sukcesis emisiigi memorstampon jam en 1952 okaze de la Japana E-kongreso. S-ro SOMEKAWA strikte kunlaboris kun li dum multaj jaroj en la filatela kampo.



Eldondato: julio 2021
 Nominalo: 63 - 84 enoj
 Formato: 32 x 38 mm
 Folioj: el po 10 pm-oj
 Tipo 1. 10 pm-oj el 84 enoj
 Tipo 2. 5 pm-oj el 63 kaj
 5 pm-oj el 84 enoj
 Bildo: foto de Kobe



Tre korajn dankojn al Est. S-ro SOMEKAWA pro la senditaĵoj kaj la koncernaj gravaj informoj!
La redaktanto

Kobe-haven-turo
 --- ruĝa turo,
 ŝlosita formo

blankaj literoj
 unua linio: (japane) *dai 69*
kai kansai esuperanto
taikai
 (esperante) La 69a Kongreso de Esperantistoj en Kansajo
 dua linio: 2021/7/31~8/1
 t.e. datoj de la kongreso

ankaŭ Kobe-haven-turo

konataj historiaj konstruaĵoj en Kobe

* desegnaĵo de poŝtmarko laŭ la simbolmarko de la kongreso

Kobe-mara-muzeo
 --- blanka konstruaĵo,
 kiu havas du pintojn


Kobe-tyō (japane)
 --- nomo de la poŝt oficejo
 (tyō signifas centro)

3.7.30
 signifas la 3a jaro de Reiwa.
 julio 30
 Reiwa estas japana erao
 * kongreso okazis en
 sabato kaj dimanĉo, poŝt-
 oficejo ne funkcias, mi do
 ricevis propran stampo de
 la poŝtoŭficejo en antaŭa
 tago de la kongreso

PASTRO INOCENTO SERIŜEV (2^a)

Elda DOERFLER

En la unua parto ni konatiĝis, tre koncizete envere, kun Pastro Inocento, fervora esperantisto kaj fervora korespondanto. Lia plej granda deziro estis kontakti kiel eble plej multajn samideanojn tra la mondo, por ricevi informojn precipe rilate eduk- kaj instru-sistemojn, por pli profundigi siajn sciojn pri aliaj kulturoj kaj ĉefe pri la vivo de infanoj kaj knaboj, koncerne ilian ekspluatadon kiel laborfortoj.



Iom mi kompletigas lian biografion, kiu, krom esti ege interesa, elstariĝas pro sia multflanka eksterordinareco. Innokentij Nikolajevič Seryŝev, [esp. Inocento Nikolajevič Seriŝev], estis siberiano, grek-ortodoksa pastro (*rusa ortodoksa*, kiel li mem skribis) kaj instruisto. Naskiĝis en 1883 en Kudara, Burjatio, Rusio, kaj mortis en Aŭstralio en 1976.

Li esperantistiĝis en 1910 kaj tuj komencis vastan propagandon en sia regiono. Post trimonata lerno de Esperanto, pastro Inocento kun sia fratino Varvara rondvojaĝis tra dek tri eŭropaj landoj, kie li renkontiĝadis kun la loka esperantistaro. Ĉiam, ĉie kaj ĉiel li propagandis per paroladoj, artikoloj, disdonado de E-broŝuroj kaj kursoj k.a. Ankaŭ liaj familianoj iĝis esperantistoj: fratino, bofratino kaj la edzino Ekaterina.

Lia artikolo, *Babilado*, aperinta en *The British Esperantist*, 1911, tiel komenciĝas:

Sidante en mia ursa angulo - en malklera rusa vilaĝo en malproksima Siberio, pri kio mi skribos al vi, karaj gesamideanoj de l' tuta mondo? Kiajn kantojn mi ekkantos sur mia modesta liro, - mi kiu estas tiel malproksime de vi, kiu estas nur modesta pastro, kiu nun estas loĝanto de iu rusa tipa vilaĝo. [...] Ho ve, mi ekkantos pri nia rusa suferanta kampano, kiu havante la grandajn kapablecojn de sia naturo, sidas en la mallumo kaj malklereco; kiu, havante la grandegajn riĉaĵojn de l' naturo, laborante nur por siaj premistoj kaj sklavistoj, mem sidas en mizero kaj portas ĉifonojn; kiu, prilaborinte la grandegajn vastaĵojn de l' rusa senlima fruktodona tero, nutras nur "superhomojn" kaj alilandanojn, mem sidante ofte senpane. [...]

Kiom amaraj, kiom suferoplenaj tiaj diroj, spegulantaj la malfeliĉan realon regantan en lia patrujo. Sed je la fino de tiu longa babilado, kiu prezentis lian tutan aventuron, nome la vojaĝon en Eŭropo, “*kian oni povus nomi kure ĉirkaŭ Eŭropo*”, li konkludas eligante el sia koro esprimojn esperoplenajn kaj pozitivajn pri la rolo de Esperanto kiel interkomunikilo kaj interkomprenilo por la tutmondaj popoloj:

Grade Esperanto trapenetros - komence laboristajn rondojn, poste la popolamasojn. Neniaj baroj malhelpos la disvastiĝon gloran de nia Esperanto.

Vivu Universala Esperanto-Asocio! Vivu Doktoro Zamenhof! Vivu la Esperantismo!

Decembre 1910 - La rusa pastro Innokentij Ŝeriŝev.

Li sentis sin, funde de sia koro, instruisto homama kaj internaciema. Lia programo estis disvastigi Esperanton pere de poŝtkartoj, sed ilin li ekuzis precipe por starigi kiel eble plej multe da rilatoj kun homoj el la tuta mondo, kun kiuj interŝanĝi ideojn pri edukado, kulturo, religio ka. Sciendas, ke ene de nur tri jaroj, 1912-1914, li sendis ĉirkaŭ 11 300 poŝt-kartojn: ducent estis liaj korespondantoj el 60 landoj de la mondo! Nekredeble, ĉu?


Julie 1919 okazis la rusa revolucio, tial li decidis konkretigi - vole-nevole - sian revon, iri al Japanio. Liaj familianoj - edzino, fratino, bofratino - telegrame informis lin pri sia decido ne forlasi la vilaĝan vivon. Do, sekve, komenciĝis alia aventurema vojaĝo, piede, trajne, ĉiaveturile, direkte al Oriento.



Ĉie ajn kie li haltis, li vigle informadis pri Esperanto. Atinginte Japanion, kie li restadis pli ol du jarojn, li eklernis la lingvon kaj konatiĝis kun la instrua metodiko japana. Studinte la lokan kulturon, li verkis la libron *Lando de Samurajoj*. Kontribuojn al la loka movado li donis per sia Esperanta-japana vortaro kaj per redaktado de pluraj revuoj. Al plej diversaj E-periodaĵoj eksteraziaj li sendis artikolojn pri siaj travivaĵoj kaj akiritaj spertoj. Poste li iris al Ĉinio, kie li instruis ĉe la Pekina Esperanto Kolegio, Kolegio de Fremdaj Lingvoj kaj Pekina Nacia Universitato kaj, intertempe, verkis *Esperantuja-n Krestomatio-n* por ĉinoj. Menciindas, ke In. Ŝeriŝev konatiĝis kun



Noto 1



1920 - Olepentraĵo pri V. E.
Pentristo NAKAMURA Tsune

Vasilij Eroŝenko. Ili havis saman rigardon al la rolo de Esperanto en siaj vivoj: Eroŝenko komparis ĝin kun la lampo de Aladino (1913) kaj Seriŝev mencias la “magian Sezamon” (1916).

Ĉiajn laborojn pastro Inocento faris por vivteni sin, eĉ li estis stratvendisto en Tokio kaj rikiŝisto en Pekino.

Li estis nekredeble aktiva kaj agema en tiuj landoj, precipe en kampoj filozofia, religia kaj pedagogia. Rilate ĉi lastan branĉon, aperas ege interesa artikolo de li verkita por la rubriko *Pedagogia Fakto* de *Sennacieca Revuo* en 1922. Ekstreme avangardaj liaj ideoj, klaraj kaj demokratiaj, subtenantaj la plenan rajton de ĉiu ajn al lernado.

Jam multe klarigas pri liaj ideoj la subtitolo de la unua alineo:

SENNACIISMO DE LERNEJO KAJ DE EDUKADO. Tio signifas ke ĉiu homo, ĉu fremdulo ĉu samregnano, povas lerni en ia ajn lernejo sendepende de nacieco, religio, raso, subregateco, socia klaso, sekso k.a. kaj [...] la spirito de lernejo devas esti ĝenerala, komunhomara, ne naciisma!

Alia titolo: *SENPAGECO DE LERNEJO. La principo estas ne disputebla!*

LIBERECO DE EDUKADO; NATURMETODECO DE INSTRUADO. Lernantoj ne devas lerni parkere, kiel nune, sed ili devas per ekskursoj, lerniloj kaj propra iniciato serĉkompreni sub gvidado de spertaj edukistoj scion pri geografio, naturscienco, fiziko, eĉ geometrio... Kantado, esplorado, kunfarado, muzikado, bestoflegado, memhigieno kaj memkuracado, studo de metioj, konstruado praktika ... Nature ambaŭseks-oj devas kunlerni...

Tro da spaco postulus la skribado de la tuta artikolo, kvankam ĝi tion meritis. Tamen eblas ĝin legi, en la arkivo de periodaĵoj de E-Muzeo Vieno.

En 1925 li petis vizon por eniri Aŭstralion, kiun, januare de la posta jaro, li akiris. Finfine li reunuiĝis kun la familianoj kaj kun sia edzino



El *ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO*,
decembro 2015 - *Esperantaj poŝtkartoj*,
de Peter Williamson, Melburno.

Ekaterina. En ĉi tiu nova kontinento li rifuzis nenian eblon gajni iom da mono por vivteni sin kaj sian familion. Fine In. Seriŝev sukcesis malfermi la unuan rusan eldonejon en Aŭstralio, ĉar tie troviĝis multnombra rusa komunumo. Malfacila estis lia vivo en tiu lando, kie li mortis en 1976: Li laboris ĝis elĉerpiĝo, li laboregis por realigi siajn projektojn kaj sekvi siajn idealojn ĝis la lasta tago.



INNOCENTO SERIŜEV - pastro, edukisto kaj instruisto, ĵurnalisto, eldonisto, orientalist, verkisto en la angla, rusa, germana k esperanta, mondvojaĝanto - li trairis la tutan Aŭstralion kun nura akompananto: bastono! -, entute elstara talentulo. Malmulte konata, sed kun neimageble intensa vivo, en kiu Esperanto ludis grandegan kaj tre valoran rolon.



Pekino 1925 (Foto-Arkivo ONB, E-Muzeo Vieno)

Noto 1, paĝo 17a - I. Seriŝev estis membro de UEA, tial li farigis glumarkojn kun surskribo U.E.A. kaj sia portreto.

Fontoj: <https://www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/kolekto-por-planlingvoj/digitaj-dokumentoj/periodaĵoj/>; Vikipedio; El prelego de Anatolj Sidorov, esploristo pri historio de la E-movado en Rusujo.



ELF-AREK

Esperanto-Ligo Filatelista

Amika Rondo de Esperanta Kolektantoj

Prezidantino:

Elda DOERFLER

Via Ghirlandaio 18/1 IT-34138 TRIESTE

testudo.ts@gmail.com

Jen mia bankokonto:

IBAN IT35 R076 0102 2000 0001 7452 996 – Banco Posta

BIC: BPPIITRRXXX

Por: Elda Doerfler

UEA-konto: ELF/AREK - Kodo: elfx/r

Jarkotizo: € 17.00 - Membroj en socialismaj kaj ekssocialismaj landoj: € 15.00

Se vi ne havas aliron al nia konto ĉe UEA, bonvolu kontakti la prezidantinon.

Kunredaktantoj: James REZENDE PITON - sudastelaro@gmail.com

Albert BOON, Esperanto-Numismatika Asocio bert.boon@skynet.be

ELF-AREK tt-t-ejo: www.kolektado.esperanto.cc



Propagandilo DOLFA

Jaroj 1930^{aj}: Kiel komforte trajnveture pasigi la multajn vojaĝhorojn? Adolf Trejbal, fabrikestro en Prago, konsilas al la vojaĝantoj per vagonaro tre utilan novaĵon, kiu eĉ defendas ilin de priŝtelo.

En kio konsistas tiu ĉi teknika eltrovaĵo? Ĝi *estas tuketo pendanta je risortoj. Oni ĝin pendigas sur breto por pakajoj.*

Malantaŭa parto de la reklamo!

Facile portebla kaj kunmetebla, ĝi eniras en ian ajn poŝon. Kiel ĝi *defendas* de ŝtelistoj, ne estas sciate.

Pro sia formo, kiel eta *hamaĵo*, ĝi permesas dolĉajn sonĝojn, sed... priatentu vian monujon!

